FN PER ANC 4+


# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL TRIMONATA BULTENO

Nº 55a (nova serio) Nº 140a SOMERO 1981

REDAKTAS : Jean GIBAUX 28 rue Raoul Dufy 76600 LE HAVRE

Eldonita, ekspedita de :
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE C.C.P. 283 40 H ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma kotizo = Subtenkotizo = ek de 15

Nura abono al Normanda Esperanto-Bulteno, sen membreco =

"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj"


# NI KUNVENIS EN MORTAIN

La Normandaj Esperantistoj kunvenis la 16an kaj aèan de Majo en la plej suda parto de nia provinco, en la ĉarma urbeto MORTAIN .

La Ĝenerala Kunveno estis organizata de niaj Gesamideanoj el Domfront, kiujn ni tre dankas pro la bona organizado kaj la varma etoso kiun ili sukcesis krei .

Por la unua fojo, ni kongresis en Abatejo. Malgraŭ la neŭtraleco de nia Unuiĝo, tio ĝenis neniun, ĉar la homoj kiuj akceptis nin estis tre toleremaj. Tiu Abatejo fariĝis loko por renkontiĝoj kaj interŝanĝo de ideoj. Ni eĉ sukcesis interesigi kelkajn religiulinojn pri nia lingvo ! La kunvenejo, la manĝejo kaj la dormoĉambroj estis tre komfortaj .

Vizito de la Abatejo kaj de Muzeo pri Afrika Arto, interne de tiu konstruaĵo, konsistigis la kulturan parton. La turisman flankon, ni bone profitis, piedirante tra bela naturo, okaze de promenado apud rivereto kun kaskadoj.

La sabata distra vespero estis interesega. Post montro de diapozitivoj pri la historio de la Abatejo, ni havis la grandan plezuron retrovi niajn geamikojn de TESPA kiuj talente prezentis teatraĵon kiu interesis ĉiujn. La bona ludo de la artistoj impresis eĉ la ne esperantistojn kiuj ĉeestis .

Dimanĉe okazis la Ĝenerala Kunveno, pri kiu vi legos aliloke : Ni nur bedaŭras ke ni ne ankoraŭ trovis junajn bonvolemajn novulojn por renovigi la Estraron ; tio tamen estas necesa por reaktivigi nian Unuiĝon .

Nia amiko VERON kiu estis en malsanulejo, ricevis permeson de la kuracisto pasigi kelkajn horojn kun ni, kaj, lin aplaŭdante, ni ĉiuj elmontris nian kontentecon pro la sukceso de tiu kunveno !

Ĉiuj disiris kontentaj, esperante sin retrovi okaze de venonta Renkontiĝo .

Petro KIJO


Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais -

Le Gérant : P. LEMARCHAND - Dépôt Légal - 2ème Trimestre 1981

## NATURAMIKA ESPERANTO SEMINARIO

En ĉarma valeto de norda Normandio, je 2 kilometroj de marbordo situas nova gastejo de Naturamikoj. Tiu komforta domo, akirita kaj aranĝita de grupanoj de Fecamp, estis rendevuejo por 35 gesamideanoj venintaj de Seine Maritime kaj de Pariza regiono .

Tiu gastejo troviĝas en Vaucottes, inter Yport kaj Etretat. Tie, dum printempo, estas belega la pejzaĝo kun multege da plenfloraj arboj, meze de verdaj herbejoj. La Naturamika domo estas malproksima de ĉefa vojo, kaj nur kantado de birdoj estas aŭdebla.

La semajnfina staĝo okazis la 11an kaj 12an de Aprilo ; ĝi estis organizata de la grupo "Esperanto-Migranto". Tridek staĝanoj partoprenis ma kursojn kiuj komencis sabate matene, kaj daŭris ĝis dimanĉe posttagmeze. La studniveloj de la staĝanoj estis tre diversaj, ĉar ili ne komencis la studadon samtempe, kaj ne uzis ne similajn metodojn Malgraŭ tiu diverseco, ambaŭ instruantinoj sukcesis harmonie progresigi la partoprenantojn kaj paroligi la plej timemajn, ne uzante la nacian lingvon . La staĝanoj pliriĉigis sian vorto-trezoron kaj pliprofundigis siajn konojn pri gramatikaj reguloj .

Sabate vespere, la staĝanoj amuzigis preparante kaj ludante diversajn skeĉojn kiuj ridigis la ĉe-estantaron.Inter la partoprenantpj estis kantisto nun bone konata kaj ŝatata en la esperantistaj medioj : Max Roy Carrouges ; li komprenenble kunprenis sian gitaron kaj li regalis niajn orelojn per ĉarmaj esperantlingvaj kanzonoj .
Post projekciado de diapozitivaj lumbildoj, ĉiuj enlitiĝis noktomeze .

La etoso estis tre simpatia. La organizantoj ne neglektis la gastronomian flankon. Bonaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kontribuis al la sukceso de la staĝo. Ni devas ankaŭ danki la sunon, kiu ebligis manĝadon ekstere. La vetero estis tre agrabla kaj, je la fino, ni promenis al la plaĝo : la maro estis tre kvieta; neniu staĝano baniĝis sed ni povis tamen admiri kelkajn kuraĝulojn kiuj ne timis malvarman akvon.

Dankindaj estu la respondeculoj de "Esperanto-Migranto" kiuj ĉion bone organizis por nia plezuro kaj por nia lingvo-sciado .

Petro KIJO

---

GEEDZIĜO — En Le Havre , nia amiko Jean COLOMBEL ligis sian vivon kun Chantal la 4an de Aprilo = La tuta Grupo deziras al ili Feliĉon kaj Sukceson . Kelkaj membroj de la Grupo ĉe-estis la edziĝan ceremonion .

ĈAGRENOJ — En Yvetot, S-ino SALLIO perdis sian patrinon ; ŝi akceptu niajn sincerajn kondoleancojn .

La Familio LEMARCHAND afliktiĝis pro la morto de la patrino de S-ino LEMARCHAND . Al ili ni sendas niajn amikajn konsolesprimojn .

I E K A ( Internacia Esperanto Klubo Aŭtomobilista ) kiu laboras por konigi esperanton en la aŭtomobilistaj medioj , preparas nun fakvortaron en sep lingvoj.
Membroj en 31 landoj . Dumviva kotizo : 20 F.
C.C.P. 1 899 91 PARIS - Sro Jean GUILLAUME

## S E P T E M B R O   E N   C O L L E V I L L E

Kiel anoncite en la Bulteno 139a, la Ĝenerala Kunveno de la Fervojista Francia Esperanto Asocio (F.F.E.A;) okazos en Colleville sur Mer (apud Port en Bessin en Calvados ) kun ekskurso-aranĝoj , de la 15a ĝis la 20a de Septembro . Oni konfirmas ke la membroj de U N E eĉ ne fervojistoj, povos partopreni .

Jen la Ĝenerala Programo kaj prezoj /

La loĝado estos en bangaloj de V.V.F. (Village-Vacances- Familles) konsistantaj el 2 ĉambroj,unu banĉambro kun duŝo kaj necesejo .

Loĝejo po 1 geo (aŭ 2 personoj) en unu bangalo, inkluzive de plena pensiono (sen trinkaĵoj) 125 F po tago/persono

Loĝado po 2 geoj (aŭ 4 personoj en unu bangalo = 110 F potago/persono

La Kunveno-semajno komenciĝos marde la 15an de Septembro .

Estos specialaj aŭtobusoj Gare de Bayeux/ V.V.F. Colleville , je la 11.15 H kaj 15.20 H . . . . . . 10 F

Marde posttagmeze : enloĝiĝo

Merkrede posttagmeze : ekskurso al Bayeux 17 F

Ĵaŭde, tuttage ekskurso al Mont St Michel 54 F

Vendrede posttagmeze ekskurso al Caen 19 F

Sabate posttagmeze ekskurso al Arromanches 24 F

( fama elŝipiĝejo, militistaj tombejoj Angla , Usona, Germana )

Sabate vespere, Bankedo k. distra parto 65 F

Dimanĉe matene : Ĝenerala Kunveno

Dimanĉo posttagmeze : disiĝo .

SKRIBU TUJ (registrado antaŭ 15a de Julio)
al Sro G.ANGENAULT route d'Asnelles 14114 VER SUR MER

Ĉirkaŭ 120 personoj atendataj, inter kiuj pluraj eksterlandanoj !

---

## POST MAJO MAJ, EN MORTAIN

Sendormaj noktoj ne plaĉas al muzo
Krom se ŝi mem maldormon alsendas
Do, mi ne povas, por via amuzo
Rakonti ĝis kie ascendas

Tro multajn erojn de nia festprogramo
Mi malhavis : pro tio jen do larmo.
Tamen ni dece tostu al la doktoro :
Jesis Li, mi estu por Majo en Mortain.

Supertostu al ina ŝoforo
Dank'al ŝi
Jen mi kun vi
Dum majo, Maj' en Mortain !

Gaston VERON

# ĜENERALA KUNVENO

U.N.E. kaj la Normanda Federacio de U.F.E havis sian komunan Ĝeneralan Kunvenon en Mortain la 17an de Majo 1981 .

Malfermo kaj salutoj S-ro QUILLIAUD malfermas la kunvenon je la 10a horo antaŭ 24 personoj, kun dankoj kaj gratuloj al la organizantoj . Ni ŝuldas la ideon kunveni ĉi-tie al F-ino POUPINET. Ni bedaŭras la foreston de S-ro VERON nun en hospitalo. Oni legas liajn salutojn kaj kun plezuro ekscias ke li povos veni kun ni por la tagmanĝo .

F-ino POUPINET salutas la Kongreson esprimante sian ĝojon ke multaj venis al Mortain . Ŝi anoncas la venon de gazetfotistoj.

S-ro QUILLIAUD sciigas ke kelkaj ne povis veni pro la tro granda distanco ; sed tamen, la Sudnormandoj devas de tempo al tempo profiti kongreson facile atingeblan . Li prezentas la salutojn de S-ro JOUIS kiu ne plu povas vojaĝi malproksimen .

S-ro ROUSSEAU atentigas ke la Internacia Kongreso de la Fervojistoj okazas ĝuste hodiaŭ, kaj pro tio kelkaj personoj ne povis veni.S-roj GUILLAUME kaj F.CHICOT el Parizo, sendis salutleteron kaj invitas la Federacianojn ĉe-esti la Nacian Kongreson(Perpignan)

S-ro POTTIER salutas nome de la Federacio.

Dum la jaro mortis S-ino LAVALLEE kaj S-ro F.NOEL en Le Havre, kaj S-ro R?PARRINGTON en Rouen .

Agadraportoj Nia Asocio funkcias bone,sed ni bedaŭras ke la Estraro ĉiam konsistas depost longaj jaroj, el la samaj 6 personoj : tio estas la minimuma nombro; fakte, pluraj aliaj aktivuloj ne membroj de la Estraro, alestas al la kunsidoj, alportante ideojn kaj helpon ( ni citu ekz. S-rojn JOUVIN kaj LOISEL . Sed ni devas nepre renovigi la Estraron por alporti freŝajn ideojn. Tri estrarkunvenoj okazis ĉi-jare, en Yvetot, Rouen,kaj Le Havre. Estas granda plezuro konstati la amikan etoson de niaj laborkunsidoj, sen disputoj, kvankam la Estraro konsistas el membroj de diversaj Esperanto Asocioj.

Du Kunvenoj ekstergrupaj okazis dum la jaro, ambaŭ sub aŭspicio de la Naturamikoj Esperantistaj : en Mantes dum Oktobro, kaj en Vaucottes, pasintmonate .

Niaj rilatoj kun la Esperanto-organizaĵoj estas tre bonaj : UFE - SATamikaro - FET - Fervojistoj .. Kun la Normanda Federacio estas des pli bonaj ke la plej parto de la estraranoj estas ankaŭ membroj !

S-ro POTTIER raportas pri la Federacio, kies aktiveco estas limigata al enkasigo kaj transpago de kotizoj . La problemo pri kasista posteno estos baldaŭ solvata. La Estraranoj kunvenas samtempe kun tiuj de U N E .

La Agadraportoj estas unuanime akceptitaj .

Financaj Raportoj U.N.E. = S-ro LEMARCHAND preparis grandajn tabelojn,alkroĉitaj al la muro, ili estas facile studeblaj . Estas nun en la Kaso : 2 122 F Dum la jaro oni enkasigis 1 265 F kaj elspezis 843 F . La ĉefa kaj nura elspezo de la Asocio estas la Bulteno : nu ! el la ricevantoj de la Bulteno, nur la triono pagas la kotizon ( diskuto okazos poste )

# Ĝ E N E R A L A   K U N V E N O (sekvo)

Financoj (sekvo) de la Federacio: S-ro TAILPIED prezentas la staton de la Kaso

| | | | |
|---|---|---|---|
| Saldo 1979 | 623 | Repago kotizoj | 3 423 |
| Kotizoj | 3 832 | Fonduzo Domo | 200 |
| | | Abonoj | 240 |
| | | Diversoj | 65 |
| | 4 445 | Saldo = 517 | 3 928 |

La Financaj Rapertoj estas akceptitaj unuanime .

Bulteno S-ro LOISEL riparigis la maŝinon ; li zorgas pri presado kaj dissendado de la Bulteno. La redaktanto estas S-ro GIBAUX kiu diras ke la ĉiama problemo estas la ricevo de artikoloj Sed pli grava estas la preza problemo, pro la altigo de la poŝtaj tarifoj : la Commission Paritaire de Presse rifuzas la enskribiĝon de NEB pro la fakto ke ĝi estas organo de Asocio. Pro tio, ni devos pagi 1,20 F anstataŭ 0,80 ; kaj la pezo ne devos superi dudek gramojn .
S-ro ROUSSEAU proponas ke oni presu la bultenon sur malpli dika papero, por gajni unu folion .
S-ro LEMARCHAND proponas ke oni sendu franclingvan leteron revokan al tiuj kiuj ne sendis sian kotizon . Ni devos poste ne plu sendi la bultenon al nepagintaj personoj .
La Federacio proponas donaci monsumon por helpi .

Agadplanoj Sekve de la supraj diskutoj pri la bulteno, kaj kostoj, F-ino Sylvie BONNET sugestas ke oni organizu Festojn por Ne-Esperantistoj, cele al profitakiro.
S-ro LEMARCHAND proponas ankaŭ partoprenon en politikaj,religiaj aŭ aliaj Festoj, kun vendo de Esperantaĵoj, ktp...
Renkontiĝo sub formo de semajnfina staĝo estas bona por la lernantoj .
Pri staĝoj raportas S-ro QUILLAUD , pri la Seminario organizita de la Naturamikoj en Vaucottes : Venis lernantoj el diversaj lokoj, lernintaj per diversaj metodoj kaj atingintaj diversajn nivelojn. Tio starigis pedagogian problemon. La kurso konsistis ĉefe el instruaj kursoj kaj modernaj aŭdvidaj lerniloj, sen libro. Estiĝis du grupoj kiuj ne ĉiam estis kun la sama instruanto. Entute, 40 personoj kun meza nivelo je 15 horoj da lernado.
S-ro GIBAUX proponas organizi ion plurope en iu difinita loko : ekzemple elekti urbon ĉiujare; organizi Feston por akiri monon kaj Staĝon por informi kaj instrui .
Oni decidas studi la eblecojn por eventuala provo venontjare.
Tiucele, la grupo en Lisieux afable proponas akcepti Estraran kunvenon, kiu okazu la 3an de Oktobro .

Elektoj Eliranta triono de la Estraro : S-roj QUILLAUD kaj GIBAUX . S-ro GIBAUX ne rekandidatiĝas, por lasi eblecon al aliaj personoj riveliĝi . S-ro TAILPIED kandidatiĝas . Li kaj S-ro QUILLAUD estas elektitaj unuanime .

Fermo de la Ĝenerala Kunveno : ĉirkaŭ la 12 h 30

## V I Z I T O J   D E   E K S T E R L A N D A N O J . . .

R O U E N   La Ruena Grupo havis la plezuron organizi specialan kunvenon, okaze de la vizito de kvar GE-AUSTRALIANOJ . Tiuj Samideanoj forlasis sian kontinenton por fari ok-monatan vojaĝon tra diversaj landoj de Eŭropo. Ili kontaktis ĉiujn UEA-delegitojn de la urboj kie ili intencis restadi .

Ili pasigis kvar tagojn en Rueno. Dum la kunveno, antaŭ 25 ĉeestantoj, ili projekciis belegajn lumbildojn pri sia lando. La komentoj estis tre interesaj, kaj instruigaj. Ni ĉiuj multe lernis pri tiu ne sufiĉe konata kontinento .

Y V E T O T kaj L E H A V R E   Ni ĝuis la ne-atenditan viziton de ĈEĤA Samideano : Franz HEIDLER , nuntempe loĝanta en Germanio. Lia vojaĝo tra Normandio estas motivita de ia pilgrimo : antaŭ 45 jaroj, li instruis Esperanton laŭ Cseh-metodo, dum tri jaroj en Belgio ... tiam, li trabiciklis Francion de l'Nordo ĝis la Pirenea Montaro, kontakte kun entuziasmaj Esperanto-Grupoj .

Kaj nun, 77 jara, li ne plu uzas biciklon, sed, trajne, li provas retrovi la spurojn de liaj tiamaj kontaktoj... Tre agrabla homo, dinamika kaj riĉa je anekdotoj, kiu uzas la lingvon kvazaŭ denaskan parolrimedon .

o—o—o—o

## A T T E N T I O N . . . . C A I S S E ! ! !

Eh oui, il faut bien en parler : lors du Congrès, à Mortain, il a été débattu du coût du bulletin; prix du tirage, réparations de machine, bien sûr, mais surtout, frais postaux qui passent, pour notre catégorie , à 1 F 20. Il est bon de savoir que, sur 300 exemplaires tirés, 50 sont expédiés à des Associations diverses, et , au moins autant, aux " Nouveaux Elèves " , pour lesquels nous assurons le service gratuit la première année (et aussi la deuxième)

Quant aux 200 exemplaires, adressés à des Esperantistes, ils ne sont l'objet d'abonnements que par une minorité de cotisants.. (à la date du Congrès, il n'y avait que 80 cotisations de rentrées au titre de 1981 .... Jusqu'à présent, le "trou" était bouché par de généreux donateurs , mais la jonction va se révéler plus difficile maintenant, et ce, justement à l'entrée d'une période où la vulgarisation de l'Esperanto va rencontrer des circonstances tre favorables dans notre pays ! Aussi, nous vous remercions vivement de bien vouloir vérifier si vous avez réglé les 10 F qui représentent la cotisationminimale.

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE C.C.P. 283 40 H ROUEN

---

VOUS AVEZ PU LIRE dans ce numéro 140 =

1- Impressions de notre Président après le Congrès

2- Stage d'Esperanto des Amis de la Nature à Vaucottes en Avril

3- Septembre à Colleville : encore une renc[illegible]e en Normandie ! 120 Esperantistes attendus, dont plusieurs étrangers !
- Un sourire de M. G.VERON , malgré le "coup du sort "

4/5-Compte-rendu de l'Assemblée Générale : on fait le point annuel, et on remarque un souffle de dynamisme pour l'avenir.

6- Encore des Voyages : un courant de Samideanoj étrangers traverse la Normandie.
- Le mot " CAISSE " fait toujours froid dans le dos : Heureusement que les cotisants retardataires vont se mettre à jour .

N.B. Le manque de place ne nous a pas permis de présenter "La Vie des Groupes" Nous prions ceux-ci de bien vouloir nous en excuser .